

Esperanto-Antologio poezia, respegulo de interetna sentado,
recenzo kun Tyburcjusz Tyblewski

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.04.12.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-167/Radiokasedo-167-8-86-A-1039-Claude-GACOND-Esperanto-Antologio-poezia-respegulo-de-interetna-sentado-recenzo-kun-Tyburcjusz-Tyblewski.mp3>

Cl.- Aŭdiĝas elsendo de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ parolas Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude Gacond.

Pri la Esperanta Antologio ni parolis antaŭ kelkaj monatoj. Hodiaŭ Tyburcjusz Tyblewski revenigas nin al tiu komuna verko por atentigi pri ĝia interetna sentado.

TT.- "Tiu ĉi antologio enhavas 706 poemojn de 163 poetoj el 35 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj" - konstatis ĝia redaktoro kaj grava kontribuanto William Auld. Tio signifas, ke ĝi estas rezulto de multetna kulturo, esprimita far reprezentantoj de ĉiuj rasoj, de diversaj mondkonceptoj kaj religioj, de multaj nacioj kaj ankaŭ de malsamaj sekso kaj aĝo. En tia bunteco nur la lingvo (la internacia) estas komuna. Utiligante la avantaĝon, ni provu traserĉi la 887-paĝan volumon laŭ spuroj de interetna pensado kaj sentado. La gepoetoj, dotitaj far la naturo per pli alta sentiveco kaj esprimantaj ĝin per siaj talentoj, estu por ni la fonto.

Tamen, ni avertu tuj, ke dum la serĉado ni intencas elimini pure esperantistajn prikantojn, da kiuj ja ne mankas en la volumo. Ni menciuj el tiuj almenaŭ: de Auld - Eklogo pri la sankta afero; de Baghy - Estas mi esperantisto; de Boia - Odo al adasismo; de Dresden - Verdaj plendoj; de de Jong - Esperanto mirinda lingvo! Kaj kelkaj aliaj.

Ilin ni do lasas ĉi-momente, ĉar ni volas trovi ekzemplojn kiel esperantaj poetoj esprimis la interetnajn aŭ universalajn spertojn sen aludi al Esperanto! Alivorte, ni intencas havi la pruvojn, ke en la lingvo internacia esprimiĝis tiaj sentoj, kiaj naskiĝas el interetna kontakto aŭ el universaleca pensado.

Cl.- Ni provu elekti laŭ titoloj ĉe alfabeto ordigitaj aŭtoroj. Jen la unua, kiu atentigas: de Julius Balbin (usonano) - **Enterigo de senŝtatulo**.

TT.-

"Rifuĝintoj ni estis el Hitlerinfero...

Venis ni al Nov-Jorko, haven' de l'espero.

Mi iĝis civitano de l' nobla Usono,

Sed por mia patro ne eĉ nura ono

De tiela digno - mankis kulturfono:

Ne plu venki li povis la lingvobarieron -

Tro maljuna por lerni de l' angla eĉ eron. (...)

Cl.- Kaj en pluaj strofoj la skua rakonto pri neebleco adaptiĝi en la nova ŝtato. Najbare ni trovas rumanon Mișu Beraru kaj lian **Metamorfozo**:

TT.-

"Forteme, pro fierobstin',

Mi ludis sensentulon;

Plej firma volo, pro knabin',
Egalas preskaŭ nulon.
Min regis dogmoj de monaĥ'
Kaj amon mi evitis;
Malsankta, voluptema aĥ,
Principojn sanktajn spitis. (...)"

Cl.- Do, ankaŭ li eksentis homece.

TT.- Ce italino Clelia Conterno-Guglielminetti (mi mem debutis en literaturo, tradukinte ŝian interesan rakonton) ni trovas poemon

Cl.- '**La angla knabo**':

TT.-
"De sub la hela hartufet' petolas
griza rigardo: *Ĝis revido* voĉas
gajamiene Humphrey, kaj sin kredas plenkreska (...)

Cl.- Sed jen Albert Goodheir (denaske nederlandano, brita civitano) kun sia **Totalismo**:
"Konfesas mi, ke mi dum jaroj fie
perfidis kontraŭ ŝtato kaj parti"
(se mi venkintus starus vi ĉi tie,
kaj vi konfesus same kiel mi).

Cl.- En **Apartheid**:

TT.-
Nigrul' irinte en preĝejon blankan
surgenuiĝis. "Rompas vi la leĝon!"
"Purigas mi la tabularon plankan".
"Nu, bone, se vi nur ne faras preĝon".

Cl.- Baldaŭ ni trafas japanon Ito Saburo, kies **Mi dezirus superstiĉon** fragmentas
Jene :

TT.-
Mi dezirus superstiĉon,
Mi kliniĝus antaŭ Di',
Eĉ respektus mi feliĉon,
Nur promesu nun al mi
Ke portos certe ĝi feliĉon (...)
Sonas voĉo ĉe l' orelo
- Helpas mi vin kontraŭ sort',
Mi estas al vi plej fidela.
- Kiu vi? - Mi estas Mort'!

Cl.- Iom pli poste ni trovas ĉeĥan poeton Jiří Kořínek, kiu en siaj "Psikiatraj versoj" prezentas **Megalomanion**:

TT.-

Kiel vi ĉiuj estas etaj
kaj mian gravon tute ne komprenas!
Kiel engrundaj vermoj tervegetaj
vi signifan vivon post vi trenas.

Se mi nur volus, ege vi ekmirus,
kion kapablas mia personeco!
Lude sukcesojn ĉiajn mi akirus,
havas talenton mi de ĉiu speco.

Miaj ideoj turas ja gigante
inter pigmea via pensmaĉado.
Mi pri enormaj aĵoj meditante
al via pen' rigardas kun malŝato (...).

Cl.- Preskaŭ tuj apud la poeto latva Nikolai Kurzens kun la demando inda de la homaro **Ĉu tio do - la vivo?**:

TT.-

Ne, ne - ankoraŭ io devas veni.

Ankoraŭ devas fajri vera tago,
ankoraŭ devas nigri vera nokto -
ne povas ja de grizo ĉio pleni.

Ĉu vere nur por nin al tombo treni,
ĉu vere nur por morti ni naskiĝis?
Ĉu tio do - la viv'? Ne, ne! Neeble!
Ankoraŭ devas, devas io veni!

Cl.- Anglino Daphne Lister en **Feliĉo** konstatas:

TT.-

Mi englutis tempobulojn senpripense,
Interne mi konstante is- kaj -osis,
Sed nun avare mi mezuras, mense
Asas; Jes, antaŭe mi elfosis
kadavrojn el florbedoj, nun sufiĉas
Se katastrofo mankas, - mi feliĉas!

Cl.- Ĉe brazila poeto Ĝeraldo Mattos ni trovas aspiron vere altan; ni citu el lia **Poeto de la homaro**:

TT.-

La poezion, kiun vi mem plektas
Per viaj sorĉaj manoj kaj mieno,
Dum viaj amaj ĝojo kaj ĉagreno,

El mia tuta koro mi elektas (...)

De viaj brulaj sento kaj deziro!
Mi kantu nur por vi! Ĝis lasta spiro,
Mi estu via bardo, ho homaro!

Cl.- Sovetiano Aleksandro Logvin reagis je la tiama mondskala evento per **Al la unua kosmonaŭto...**

TT.-

Estis vi matene nur revuiro;
Ciolkovskij dirus: "Flugemul'!"
Kaj tagmeze - iĝis vi famulo,
La unua Kosmonaŭt - Herkul'!
Vi revenis de la stelaj foroj
per la nekonata glora voj' (...)

Do, jes; en esperanta poezio ni trovas ne unu ateston, ke la gepoetoj vivas en reala mondo, kaj ke ili prikantas ĝin akorde kun sia percepto. Ni povus kaj certe revenos al la volumo por serĉi aliajn atestojn. Tamen jam nun rimarkeblas iu manko, iusence surpriza en tia artaĵo. Mi pensas pri manko de bildoj de tiu dramo, kiu ja turmentas la homaron - la neebleco interkompreniĝi kun aliaj homoj. Krom la krio de Balbin kaj krom postaj emfazoj pri Esperanto mem - nenio. Aŭ eble mi ne sufiĉe serĉis? Ni plu provos.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Tyburcjusz Tyblewski kaj Claude Gacond. Ĝis la venonta sabato!